

## Gvidilo por prizorgo de la Koleghelpa Kaso

La Interna Regularo de ILEI ne mencias la Koleghelpan Kason. La regularo estas nun sub revizio (feb. 2011), sed ĝi starigas aŭ antaŭvideble starigos kelkajn devojn por sekciestroj, sekcioj kaj reprezentantoj, kio havas implicojn por tiuj subtenataj de la Koleghelpa Kaso.

- Sekciestro devas fariĝi internacia membro de ILEI en la jaro antaŭ la peto-ektrakto.
- Sekciestro devas resti tia membro de ILEI en la jaro de la peto-ektrakto, kaj tra sia oficperiodo.
- Sekcio devas havi kvin internaciajn membrojn okaze de la peto-ektrakto, kaj devas resti ĉiam minimume kvin tra la vivo de la sekcio.
- Sekciestro devas raporti ĉiujare pri la sekcia agado.
- Reprezentanto devas fariĝi internacia membro de ILEI en la jaro de la peto-ektrakto.
- Reprezentanto devas resti internacia membro de ILEI tra sia oficperiodo.
- Reprezentanto devas raporti ĉiujare pri la enlanda agado kaj planoj por fondi sekcion aligotan al ILEI.

Subtenito el antaŭa jaro, kiu ne montris vivsignon aŭ raportis kiel supre priskribita, ne povas kandidatiĝi por subteno en la kuranta jaro.

Jen laŭmonata organiza skemo por la estraro, koncerne la uzon de la Kaso:

### Novembro

- Sekretario preparas modelajn mesaĝojn por dissendo al sekcioj kaj unuopuloj kaj stokas ili en la estraro retejo, por esti alirebla al ĉiu rajtigito.
- Prezidanto kaj sekretario kune ĝisdatigas la modelan raportilojn por la Landaj Sekcioj kaj Reprezentantojn.

### Decembro

- Sekciestro kontaktas ĉiun Landan Sekcion kiu havis KhK membrojn en la antaŭa jaro, petante refreŝigon de la listo por la sekva jaro. Tiu mesaĝo emfazu ke kondiĉo por la subteno estas ricevo de sekcia raporto pri la finiĝanta jaro. Por ili la limdato estu 15 februaro, ne 31 marto.
- Sekretario en decembro dissendas al ĉiuj Landaj Sekcioj kaj reprezentantoj la modelan raportilon, indikante la du limdatojn donitaj supre.
- Kasisto informas la estraron pri la stato de la Koleghelpa Kaso (KhK), kaj donas rekomendon pri la disponebla sumo por la venonta jaro.
- Sekretario kontaktas ĉiun unuopulon (ne aligitan tra sekcio) kiu en la finiĝanta jaro estis subtenata, petante ĉu ili petas daŭrigon de la subteno en la sekva jaro. Se jes, ili sendu koncizan raporton pri sia agado tra la ĵusa jaro.
- Sekretario lanĉas alvokon tra ILEI-listoj kaj hejmpaĝoj, memorigante pri la regularo kaj invitante proponojn aŭ sinproponojn por novaj subtenotoj ĝis la regulara limdato de 15 januaro.

### Januaro

- Surbaze la de revenintaj reagoj, sekretario kaj kasisto kompilas liston de sekciaj petoj kaj unuopuloj, kaj refoje admonas sekciojn kaj unuopulojn kiuj ne reagis.

### Februaro

- Je februaro 15 la sekretario kaj kasisto fermas la liston, kaj sendas al la estraro la liston de kandidatoj, eventuale kun prioritatigaj rekomendoj (vidu modelon SMG el 2009). En la listo staru nur kandidatoj kies sekcioj petis renovigon kaj sendis raporton iuspecan, aŭ kiuj kiel reprezentantoj aŭ unuopuloj petis la remembrigon kune kun ia motivo.

- Post la voĉdono, la sekretario anoncas al la koncernatoj la rezultojn, antaŭ la fino de Februaro.
- La sekretario kaj kasisto kune aldonas tiujn personojn al la membrolisto, tiel ke ili estu komunikitaj al FEL kune kun la ceteraj paperaj membroj ĝustatempe por la dissendo de IPR numero 1 por la nova jaro.

Kaze de malsufiĉa mono en la kaso, la estraro elektas nur tiom da membrigoj kiom financeblas kaj lanĉas alvokon al la membroj por pli da subteno. Se venas rezultoj al tio, la estraro povas aldoni subtenatojn, el la kompilita atendo-listoj. La estraro ne rajtas senkonsulte al la komitatoj membrigi pli da homoj ol la Koleghelpa Kaso permesas.

La prefero estas, ke KhK-membriĝoj rilatu al B-landa membreco kun presita IPR (€9 por 2011). Se la rimedoj malsufiĉas, eblas akcepti retajn KhK-membrojn, sed nur kun la konsento de la sekciestro kaj la koncernato. Ĉiu subtenata sekcio ricevu almenaŭ unu fizikan ekzempleron de IPR.

SMG, 8 feb, 2011, surbaze de proceduro kreita en majo 2009.  
D:/.../ILEI/Membroj kaj krome sub 'Financoj'.